

esperanto gazeto

DE INTERNACIA INSTITUTO POR
OFICIALIGO DE ESPERANTO



EL LETEROJ AL LA REDAKCIO

MONTAGU C. BUTLER

Britaj esperantistoj sendube surpriziĝis legi nekrologon pri M.C.B. (EG 42), farantan nenian aludon al la leksikografa monumento, al kiu li dediĉis 20 jarojn de la vespero de sia vivo: la ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Ĉi tiu majstroverko estas nepra havaĵo de ĉiu serioza anglauzanta esperantisto.

A. H. Middlemast
Bournemouth, Anglujo

PLUJAJ ELDONAĴOJ

Traleĝinte la interesan artikolon »Homoj Adoptas kion ili Bezonas« en E-Gazeto 29/69, mi ekpensis ke estus necese klopodi eldonadi gazeton semajnan aŭ monatan en Esperanto pri la plej gravaj mondaj ekonomiaj kaj politikaj eventoj. Ĝi povus esti eĉ nur la esperantlingva eldono de iu ekzistanta gazeto pri tiuj temoj.

Mi supozas ke Jugoslavio, lando kun sendependa politiko, estus bona loko por tia eldono, ĉar tiel ĝi povus esti objektiva. La artikolojn oni ja povus transskribi el aliaj gazetoj. Ĝi povus esti eĉ resumo de la monda gazetaro tiutema.

Kompreneble IOE ne devus necese esti la eldonanto. Vi povus kun via aŭtoritata propono turni vin al

NIA KOVRILPAGO

Komenciĝas la tria, plej granda ĝis nun, kunveno de la ĉefoj de 63 eksterblokaj ŝtatoj, en Lusako, ĉe-furbo de Zambio. Pri tiu grava kunveno ni publikigas tekston sur la mezaĵa paĝoj.

aliaj esperantistaj instancoj. Antaŭ la realigo de la ideo estus bone esplori la opinion de la esperantistaro, por vidi kion oni opinias pri tia utiligado de nia lingvo.

Krom la menciita ankaŭ aliaj eldonadoj estus eldoneblaj: muzika-filma, teknika, studenta k. a., kun aktualaj informoj el la tuta mondo. Tiaj eldonadoj grave helpus la praktikan uzadon de Esperanto.

Tadeo Sobieraj
Koszalin, Polujo

Resp. de la Red.: Similajn ideojn ni havis kiam ni komencis eldonadi EG (tiam: IOE-Gazeto). Tial ni nomis unuopajn paĝojn »Sporta Gazeto« »Geografia Gazeto«, »Turisma Gazeto« ktp. Tamen la tempo montris, ke la esperantistaro bedaŭrinde ankoraŭ estas nek sufiĉe multnombra nek sufiĉe matura por subteni tiel gravajn aferojn. Tiel eĉ EG baraktas kun financaj malfacilaĵoj pro manko de sufiĉe da abonantoj en transpagipovaj landoj. Alia malfacilaĵo estas la manko de redaktoroj. Imagu ekzemple, ke EG-on devas redakti la direktoro de IOE, ĉar li ankoraŭ ne trovis personon kiu lin pretus anstataŭi!

Ofte oni aŭdas ripetadi, ke la esperantistoj ne havas monon por subteni tiun aŭ jenan »bonegan ideon«. Intertempe oni elspezadas grandegajn sumojn en senutilaĵojn. Imagu nur, se la 2.000 kongresanoj nur unu jaron rezignus pri tiu amasrenkontiĝo, ilia kongreskotizo, kiu ampleksas ĉ. 60.000 dolarojn, povus esti utiligata por realigi gravajn planojn por la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon.

Sed ĉu vi, sinjoro Sobieraj akceptos la taskon konvinki ilin pri tio?

LAŬDOJ NE SUFIĈAS

La nova de IOE lanĉita metodo en la Esperanta propagando estas laŭ mi tre esperiga, kaj meritas la aktivan subtenon de ĉiu serioza homo, al kiu la ideo de unu mondlingvo ne estas indiferenta. La enhavo de la artikoloj de EG estas ĉiam interesa, pli proksima al la kuranta vivo, kion oni malofte trovas en aliaj Esperantaj gazetoj. Kiel instruisto de Esperanto en mezlernejo mi multe uzas el ĝi dum la instruado.

Sed la laŭdoj ne sufiĉas, oni devas helpi. Do mi havas esperon, ke mi sukcesos varbi por EG almenaŭ kelkajn novajn abonantojn.

Marian Tyszkiewicz
Wroclaw, Polujo

Resp. de la Red.: Guste kiel vi diras: laŭdi ne sufiĉas! Suprenfaldi do la manikojn, kaj ek al laboro!

DE LA UNUA PAGO ĜIS LA LASTA

La gazeto de vi redaktata ege plaĉas... ktp. ktp.

A. Vizgirdas
Klaipeda, Litovio

Resp. de la Red.: Dankon pro la belaj pensoj al vi kaj al ĉiuj kiuj sendas al ni gratulojn kaj laŭdojn. Bonvolu legi ankaŭ la supran respondon.

ĈU DIKULO AŬ DIKKAPULO?

Ni ĉerpas el »ESPERANTA FINLANDO« 6/70.

»Ni ofte parolas pri la granda, vasta esperanta popolo. Ni estas instigitaj varbi »unu novan anon« ĉiujare, ni ĉiuj devus kontribui al la kreskado de membraro de niaj organizoj.

»Sed ĉu ne estas erara strebado? Ĉu ne, kiel fina rezulto, la kvalita



ESPERANTOGAZETO

ORGANO DE INTERNACIA INSTITUTO POR OFICIALIGO DE ESPERANTO

OKTOBRO-NOVEMBRO 1970 * N-ro 43-44
(Jaro V/8-9)

Cefredaktoro: T. Sekelj, Pop Lukina 1, Beograd
Aperas 10 foje jare.

Bankkonto: Beogradska udružena banka,
608-620-1-1-32000-10-458 I.O.E. Beograd, Jugoslavio
Por Jugoslavio: 608-8-1353-10

ESPERANTO-GAZETO. Izdaje: Međunarodni institut za ozvaničenje esperanta, Beograd, Lole Ribara 14.

Odgovorni urednik: Antonije Sekelj, Beograd, Kondina 24.

Štampa: Štamparija „Sava Mihić“ Zemun,
Maršala Tita 46-48.

nivelo da nia movado malaltigas. Plej granda parto el esperantistoj estus en tia kazo komencantoj. Ĉu ne estus pli bone unue prizorgi, ke ni mem, la nunaj esperantistoj, estos kapablaj oferti ion al la multaj novuloj, kiujn ni provas allogi.

»Alie la movado estas kiel malsana dikulo, kiu scias, ke estas malutile multe manĝi, sed ne volas resti sen siaj karaj bongustaĵoj. Fine tia dikulo suferas tro fruan morton.

»Ĉu ne estus pli bone kreskigi la carbon, ne la ventron, de esperanto-movado?

arvikolo«

Resp. de la Red. Kara arvikolo, ne timu. La korpo tiel malrapide kreskas, ke nenia danĝero ekzistas pri ĝia trodikigo. Jam multajn jarojn »la korpo« fakte danĝere stagnas. Kaj tio okazas eĉ malgraŭ tio, ke kelkaj organizaĵoj dediĉas ĉiujn siajn energiojn al la varbado de membroj



por sia organizo, tute neglektante la ideon pri kreado de novaj esperantistoj.

Cu vi ne timas ke, se ni dediĉus nin nur al lingva perfektigo de la nunaj esperantistoj, sen plua varbado, ni ĉiam pli kaj pli enfermiĝadus inter niaj fortikaj muroj, kaj ni fariĝus malsanulo kun grandega kapo, kiu estus malutila, ĉar eĉ marŝi ne povus?

Efektive vi bone konstatas, ke »io putras en la lando dana«, kiel ankaŭ multaj aliaj tion sentas, tamen vian diagnozon mi ne kredas korekta.

Se ni ĵetus niajn tutajn fortojn al la enkonduko de Esperanto en la uzon en diversaj fakoj, pli kaj pli da homoj devus ĝin lerni pro sia bezono, kaj ne pro nia varblaboro. Aliflanke, ili ĉiuj devus efektive lerni la lingvon, ĉar sen scio ili ja ne povus ĝin uzi.

Pripensu tion, kara arvikolo kaj... ni atendas vin en niaj vicjoj!

KOMPUTERA LINGVO

Rilate la artikolon en EG n-ro 35—36 »Patentoj kaj komputilo« de M. E. Falla, mi respondas:

Prepari lingvon per komputiloj oni povas nuntempe nur per la konataj metodoj de la elektrona prilaboro de valoroj. Esperanto taŭgas por tio, ĉar ĝi estas planlingvo. Kiel elirpunkto mi elektus la algoritmon, nome la DUALO-sistemon. La grammatiko kun la 16 reguloj estas programebla kaj sur la vojo de la trovesploro (G. Findensforschung) la radikoj kaj finaĵoj estas kunmetebaj.

Pli malfacila estas la tradukado al nacilingvoj. Eĉ se ankoraŭ ne plene solvita, tamen pli facile estas pri germanaj kaj romanaj lingvoj, dum pli malfacile kiam temas pri la familioj slava, finn-ugra, araba kaj aziaj kaj afrikaj lingvaj familioj. La eksperimentoj deĉifri lingvojn helpe de kibernetiko, estas ankoraŭ en la komenco. (La traduko de la majaaĵ hieroglifoj far de sovetiaj sciencistoj estas en komenca fazo). Multaj miaj provoj trovi tradukmanieron en nacilingvojn, estas ĝis nun partaj kaj neperfektaj. Tamen oni ne devas forlasi la eksperimentadon.

Tamen antaŭ ĉio oni devas difini ĉu Esperanto estos la moderna internacia mondlingvo, ĉu ĝi venkos kontraŭ siaj naciaj kontraŭuloj. Ni esperantistoj certe voĉdonos »por«.

K. J. Thormann
Schwerin/M, GDR

REGISTRITA SENDAĴO

La 10-an de julio 1970 mi sendis al la adreso de EG registritan poŝtkarton kun reklamacio ke mi ne ricevis la numerojn 38 kaj 39 de la gazeto, kvankam la n-ro 40 alvenis. Ĉar ĝis nun mi ne ricevis respondon, nek la mankantajn n-rojn, mi petas estu tiel afabla kaj skribu al mi, kiam la redakcio kaj administracio volas pritrakti mian reklamacion. Mi rimarkigas, ke respondo je mia letero mi ricevis el Ĉinio dum 32 tagoj je la respondo el Jugoslavio mi atendas jam 45 tagojn.

Košice, 23. 8. 1970. Stefan Dulović

Resp. de la Red.: Ni publikigis ke nia oficejo na funkcias dum julio kaj aŭgusto. La leterportisto, ne povante liveri la registritan sendaĵon, lasas tie informon ke ni havas registritan sendaĵon, kaj kie ni povas ĝin preni. Se neniu prenas ĝin dum 5 tagoj, oni resendas ĝin al la sendinto. Tiel ni tute ne ricevis vian plendon. Tamen, eĉ se la poŝtkarto ne estus registrita, ni trovus ĝin nur nun, post nia libertempo. La mankantaj numeroj estas al vi senditaj.

»EROTIKO«

En la numero 36/37 de EG aperas bildo kun la subskribo »profanigo:

sekte kaj nudo«. Tamen la virino sur la bildo estas nek nuda nek seksincita. La titolo estas do iom maldelikata. Ni prefere skribu: »erotiko«.

Oskar Stolberg
Leipzig, GDR

PERSONAJ NOVAĴOJ KAJ POEZIO

Hodiaŭ estas tag' neordinara
Por vi, por mi, por mia familio;
Hodiaŭ ni akceptas gastojn karajn
El fora kaj beleaga land' Francio.

(Jen la unua strofo de versaĵo de Petro Poliŝeuk el Taŝkento, kiun li verkis okaze de vizito de Paŭlo kaj Johanino Astro en lia hejmo).



Resp. de la Red.: Kara amiko Petro, mi ege estimas viajn personajn sentojn kaj eĉ vian poeziemon. Tamen vi kiel nia efika kunlaboranto, kiu bone konas la klopodojn kaj batalon de IOE kaj EG, certe akceptos nian starpunkton kutime ne publikigitaĵajn personajn sciigojn kaj ankaŭ ne poemojn, krom eble unufoje jare sur »literatura paĝo«.

La samo validas por aliaj niaj amikoj, kiuj honorigas nin per alsendo de poemoj.

EN TURISMON

Jen ideo por oficialigo de Esperanto en turismo:

Eble tio jam estas ideita de alia. Nun, se oni intencas viziti alian landon resp. ferii tie neuzante sialandan turistagentojn, sed laŭ propra organizo, oni unue skribu al turistoficejo de la dezirata lando kaj loko petante prospektojn, prezojn kaj informojn.

Tion oni faru, kompreneble, en Esperanto! Samtempe oni aldonu la adreson de iu loka esperantisto, kiu povus traduki la leteron. Li tion faru laŭle kontraŭ honorario. Se ni ĉiuj sekvos tiun ideon, ĝi certe havos kun tempo gravan efikon.

Albert F. Stephan
Düsseldorf, FR Germanujo

Resp. de la Red.: Via ideo estas bona kaj sekvenda. Tute ne zorgu pri tio, ĉu iu jam antaŭe pensis ion similan aŭ ne. Se jes, tio nur konfirmas la taŭgecon de la penson. Ni aliĝas al via konsilo.

NOVA STRATO — NOVA NOMO



La bildo montras la inaŭguron de nova strato kun la nomo de L. L. Zamenhof, en Castel San Pietro Terme, okaze de ekskurso dum la IFEF kongreso en Rimini. Laŭ la domo ankoraŭ ne finkonstruita, kaj la strato trafosita oni vidas ke la strato estas tute nova. Al tia »strato por la estonto« certe bone konvenas nomo de homo kiu iniciatis lingvon »por la estonto«.

(Foton sendis Gimelli)

PORINSTRUISTA KURSO
EN GDANSK

De la 4-a ĝis la 24-a de julio ĉi-jara okazis en Gdansk, Polujo metodika kurso por instruistoj de

Esperanto. Kursejojn kaj loĝĉambrojn disponigis la lokaj lernejoj aŭtoritatoj en Teknikumo kies direktoro, inĝ. Tadeusz Makuch efike kunlaboris. Ĝenerala organizanto de la kurso estis prof. J. Toczyski kaj la scienca gvidanto prof., A. Greła.

Tiun ĉi kvaran kurson tiaspecan partoprenis 33 geinstruistoj, el kiuj 23 ekzameniĝis kaj ricevis diplomojn.

La kurso enhavis 88 instruhorojn el esperantologio, la historio de la Esperanto-movado, pri gramatiko kaj sintakso, pri laboro kun junularo, pri instruhelpiloj, pri E-organizaĵoj, metodiko de Esperanto-instruado kaj instruado de fremdaj lingvoj, Krome okazis konversaciaj horoj kaj provlecionoj de gekursanoj.

(Laŭ inf. de prof. J. Toczyski)

SENPAGE TRA JUGOSLAVIO

La venontjara IFEF-kongreso okazos en majo 1971 en Maribor (Jugoslavio), kaj la organizaj laboroj jam bone progresas. Oni preparas krom la oficiala parto tri interesajn tuttagajn ekskursojn.

Interesa novaĵo estas, ke ĉiu partoprenanto de la Kongreso, kun la sola montrado de la kongreskarto, rajtos veturi en la unua klaso de la jugoslavaj fervojoj senpage dum la tuta monato majo, kien ajn en la tuta lando, kaj kiom ajn da fojoj. — Gratulon al la organizantoj pro tiu interesa atingo.

Por aligiloj kaj informoj: 23-a Kongreso de IFEF, MARIBOR, Jugoslavio.

(El informo de M. Ĝ.)

LETEROJ

Mi sendas al vi paĝon el la vojevodiana gazeto »Głos Robotniczy« (la laborista voĉo) sur kies paĝo troviĝas mia traduko de la artikolo »La Sepa Kontinento invitas IOE« el la numero de marto 1970 de Esperanto-Gazeto.

La traduko mencias la nomon de via (de NIA!) gazeto kaj de IOE. Ĝi aperas en 200 mil ekzempleroj kaj estas legata en tuta vojevodio de Lodz.

Finante mi sincere gratulas pro via laboro por la antaŭenpuŝo de Esperanto.

Antoni Madej
Tomaszow-Maz., Polujo

Resp. de la Red. Koran dankon al vi kaj al ĉiuj aliaj, kiuj de tempo al tempo publikigas tradukojn el EG, kaj sendas al ni eltranĉaĵojn aŭ la tutan paĝon aŭ gazeton. Tiu estas unu el la tre efikaj metodoj por atentigi la publikon pri nia ekzisto.

»EL LA KLUBA VIVO«

Post la somera paŭzo nia societo rekomencis siajn kunvenojn...

S. Meilande Latvio

Resp. de la Red. Estas agrable ricevi sciigojn de diversaj organizaĵoj, lokaj, landaj, fakaj, internaciaj. Tamen, en EG ni ne povas publikigadi lokajn novaĵojn, pri prelegoj, kunvenoj, seminarioj, ekskursoj ktp., ĉar tiaj okazadas ĉiun semajnon en pli ol mil lokaj grupoj. Ni estus maljustaj se ni el ili elstarigus unu aŭ tri.

Sed ne temas nur pri tio. Ankaŭ ne nur pri la manko de nia tre limigita spaco. Sed ĉefe pri la fakto, ke la tasko de EG ne estas informadi pri internaj novaĵoj de niaj organizaĵoj. Eble vi rimarkis ke ni plej ofte ne raportas eĉ pri kongresoj en kiuj partoprenis miloj da esperantistoj. Pri ili ja raportas ĉiuj aliaj E-revuoj, kaj vi povas tie informiĝi.

Ni plej volonte publikigas novaĵojn pri la praktika uzo de E., pri kunvenoj en kiuj tiurilataj decidoj estas faritaj, aŭ simple artikolojn celantajn al la enkonduko de E. en la praktikon.

La ceteran spacon ni preferas uzi por amuzi kaj informi pri aktualaj problemoj.

FONETIKE INTERKRAMPE

En la 39-a numero de »E. G.« mi kun intereso legis artikolojn pri geo-

grafiaj nomoj kaj mondmapo. Mi tute konsentas kun la Redaktoro T. Sekelj, kiu respondis al la aŭtoroj de artikoloj. La ekzemplo kun hinda, ĉina aŭ japana kaj greka, slava ktp. nomoj estis bonega. Sed ĉu ne tio same estas en nia Esperanta gazetaro? Ni ofte legas la Esperantajn artikolojn tute simile kiel en la ekzemplo de T. Sekelj: »Alveninte al iu mi renkontis iun sinjorinon. Ŝi rakontis pri iu urbo ...« Ĉar ni ne scias la lingvojn anglan, francan, hispanan, germanan, portugalan kaj aliajn ni ne povas legi multajn Esperantajn artikolojn vere kaj uzi ilin. Ŝajnas al mi la plej taŭga estus la skribmaniero, kiun ni vidas ankaŭ en »E. G.« sur la paĝo 3. La aŭtoro el Hungarujo en la artikolo »Tendumo de junpioniroj« sukcese montras al ni bonan eliron. Post nacia skribo de urbnomo li donas la saman nomon en Esperanto enmetitan inter krampoj: »En Harkány (Harkanj), ... Pécs (Peĉ)«. Do, kiel vi vidas, ni vere kaj facile povas legi ĉi-vortoĵojn eĉ se ili estos menciitaj dum ĉiu artikolo kelkfoje sen Esperanta traduko. La samon povos fari ĉiu el ni, se ni skribas artikolon en gazeton ktp.

Nikolaj Starodubcev,
Doneck, Ukr., Sovetunio.

MEMORINDAJ VORTOJ DE PREZIDENTO JONAS

Ciuj niaj legantoj bone scias ke EG kaj ankaŭ IOE fondigis kun la celo enkonduki Esperanton en la praktikan uzon. Ni fakte konsideras tiun klopodon en la nuna tempo la plej inda elspezo de energio, tempo kaj mono.


Sed ne ĉiam ni parolu pri tio. Ni transdonu la vorton al sendube la plej altranga esperantisto de la nuntempa socia kaj politika mondo, D-ro h. c. Franz Jonas, Prezidento de Aŭstrujo.

En sia sagaca, trankvila sed enhavoplena inaŭgura parolado dum la 55-a UK en Vieno, interalie li diris:

La problemo de internacia helplingvo jam delonge ne plu estas nura teorio. Esperanto solvis tiun ĉi problemon, ĝi realigis la teorion kaj transigis ĝin al praktiko. Dum jardekoj en multaj landoj ne nur estas tradukitaj juvelaj verkoj el naciaj literaturoj, sed aperas ankaŭ multege da verkoj skribitaj originale en Esperanto. En multaj landoj aperas Esperanto-gazetoj, kiuj ne nur perfektigas la adeptojn en lingva rilato, sed ankaŭ disvastigas valoran scion trans la etnikajn limojn, de kontinento al kontinento, tra la tuta mondo.

Esperanto ĝis nun sukcese trapasis ĉiujn ekzamenojn al kiuj ĝi estis submetata flanke de scienco kaj tekniko, de politiko kaj komerco, de pedagogio kaj literaturo. Kian pruvon do pri la taŭgeco de Esperanto la dubantoj krome bezonas? Nur la propran sperton, propran sperton anstataŭ malsaĝa antaŭjuĝo!

KARAJ GESINJOROJ, LA ESPERANTISTOJ DUM LA PASINTAJ JARDEKOJ KONSEKVENCE VARBIS POR LA IDEO DE INTERKOMPRENIGO PER INTERNACIA HELPLINGVO. ILI ESTIS LA PROFETTOJ DE LA MOVADO. LA NUNA



GENERACIO DE ESPERANTISTOJ JAM ESTAS LA PIONIROJ DE ESPERANTO EN LA PRAKTIKA VIVO. Sed ili neniam forgesu, ke Esperanto ne nur estas rimedo por la ĉiutaga praktika vivo, sed ke ĝi estas eterne ligita al grandaj kaj altaj idealoj: al solidareco de la popoloj, al progreso de la homaro, al paco de la mondo!

Admirinda estas la klarvido de la ŝtatestro, kies okupoj ne permesas al li multe okupiĝi pri movadaj problemoj. Li perfekte analizis la problemon kaj diagnozis pli ĝuste ol tion kapablas homoj okupantaj gravajn postenojn en la movado, kaj kiuj pro la samaj ideoj proklamas IOE herezularo kaj rifuzas ĝin agnoski kaj kun ĝi kunlabori.

FORESTOS LA DIREKTORO

Mi informas la kunlaborantojn de EG kaj IOE, la abonantojn kaj amikojn de nia gazeto, ke komence de decembro mi forveturos al Aŭstralio, Novzelando kaj Nova Gvineo, kie mi intencas restadi ĝis majo 1971.

Pro tio mi petas ĉiujn poŝtaĵojn koncernantajn IOE aŭ Esperanto-Gazeton, aŭ ion ajn alian, direkti al la Ĝenerala Sekretario: Antoniĵe Sekelĵ, Kondina 24, BEOGRAD, Jugoslavio.

Tibor Sekelĵ

REDAKTA KOMITATO POR »ESPERANTO-GAZETO«

Pro la foresto de la redaktoro, la redaktadon de ESPERANTO-GAZETO ekde la venonta numero transprenos **Redakta Komitato** konsistanta el kvar personoj: Ilija Antoniĵeviĉ, Branko Radakoviĉ, Greta Stol kaj Antoniĵe Sekelĵ. Kaj ĉiuj kvar estas bonaj kaj malnovaj esperantistoj, du el ili profesiaj ĵurnalistoj, la tria iama redaktoro de »La Suda stelo«. La kvara estas bona konanto de IOE kaj la movado ĝenerale.

Al la redaktora kvaropo la ĝisnuna redaktoro deziras fruktodonan kaj plezurajn laboron.

Gvidanto: MANFRED FUHRER
Poŝtfako 162
D—3340 Wolfenbüttel
FR Germanujo

I. DIFINO DE LA AGADKAMPO

Sub la nomo »sociaj organizaĵoj« ni komprenas ĉiuspeciajn organizaĵojn, al kiuj homoj libervole aliĝas, kaj kies baza celo ne estas la komerca profito.

La celoj de tiuj organizaĵoj povas esti plej diversaj:

- a) Konservado de la homaraj vivobazoj (ekz. porpaca movado, naturprotektado, iktp.)
- b) plibonigo de la vivkondiĉoj (koopervivoj por akirado de vivbezonaĵoj, sindikatoj ktp.)
- c) idealoj (Ruĝkruco, Samaritanoj, Rotario ktp.)
- ĉ) kulturo (muzikasocioj, kantasocioj, junularorganizaĵoj, studentaj, teatraj, literaturaj, klerigaj kaj aliaj organizaĵoj)
- d) pasigo de libera tempo (feriaj kaj turistaj asocioj, kampadistoj, junulgastejoj ktp.)
- e) hobiaĵoj (poŝtmarkkolektado, numismatiko, aermodelado ktp.)

En ĉiuj tiaj organizaĵoj ni komencu — laŭvice — kampanjon por la enkonduko de Esperanto en iliajn internaciajn rilatojn.

II. LA PROCEDO

Antaŭ ĉio estas necese kunordigi la agadon. En multaj sociaj organizaĵoj unuopuloj klopodas kaj baraktas kun apenaŭ videbla rezulto. Anoj de samaj organizaĵoj nepre kuniĝu por labori komune.

Tial mi alvokas nun ĉiujn esperantistojn, kiuj estas membroj de iu socia organizaĵo: Serĉu kontakton kun aliaj esperantistoj en via medio, se eble kunvenigu ilin al konferenco kaj starigu agadkomitaton. Samtempe akiru laŭeble pli da adresoj de alilokaj kaj alilandaj samcelanoj, kaj klopodu kontakti ilin.

En kelkaj sociaj organizaĵoj jam ia organizita agado por Esperanto ekzistas:

1. **Sindikatoj.** En tiu movado ni verŝajne trovas, krom en la konsum-koopervivoj, la plej grandan nombron da esperantistoj. Tamen nenia konsiderinda aktiveco montiĝas en tiu medio. La esperantistaj sindikatanoj — tre bedaŭrinde — ankoraŭ ne sukcesis kunordigi siajn aktivadojn kaj daŭrigas barakti izolite, ĉiu laŭ sia propra gusto. La rezulto el tiu senplana laboro logike restas modesta.

2. **Rotario.** La esperantistoj membroj de tiu ĉi vasta organizaĵo grandparte estas organizitaj en RADE (Rotario-Asocio De Esperantistoj), kies sekretario estas s-ro Norman Williams, 237 Two Trees Lane, DENTON, MANCHESTER, Britujo. Dum la rotario konvencio okazinta antaŭ du jaroj en Nico la rotarianoj faris certajn klopodojn, kun modesta sukceso. Nuntempe s-ro Williams fariĝis gubernatoro de sia rotaria distrikto, kaj promesas esti plie aktiva ankaŭ en la poresperanta laboro. Ni atendas konkretajn informojn, por povi aktive subteni lian agadon.

3. **Skoltismo.** Ankaŭ tie ekzistas organizita laboro por Esperanto, kaj IOE havas bonan kontakton kun la respondeculoj de SEL. Mi esperas baldaŭ starigi firman kaj pli efikan kunlaboron. En la skolta mond-

organizaĵo estas atingita la oficiala agnosko de Esperanto, kaj nun, en la proksima etapo, t. e. la realigo de tiu atingo, ni devas plenforte kunhelpi.

4. **TAN-movado.** En tiu naturamika movado, kiu laŭ sia statuto favoras internacian interkomprenigon kaj amikan kontakton, kaj kiu okupiĝas ankaŭ pri kulturo, socia turismo, protektado de la naturo kaj konservado de la naturaj vivofundamentoj por la homaro, okazas bone organizita kaj tre prospera agado favore al la enkonduko de Esperanto. Taneŭ la Esperanta sekcio de TAN, eldonas propran gazeton »La Migranto«, kaj disponas pri nombro da Esperanto-fakgrupoj sur landa kaj loka niveloj. Ĉiuj-ĉi grupoj estas internacie kunligitaj en la menciita organizaĵo, kiu estas oficiale agnoskita kiel fakorganizaĵo de TAN. Malgraŭ tiuj atentindaj sukcesoj, pli kaj pli montriĝas, ke tiu laboro en la nuna stato povas pli progresi nur, se la Internacia Lingvo baldaŭ pli disvastiĝos ankaŭ en aliaj medioj.

5. **Diversaj.** Estas konate ke en pluraj aliaj sociaj organizaĵoj ankaŭ estas entreprenitaj diversaj paŝoj favore al Esperanto. Mi alvokas ĉiujn esperantistojn interesitajn pri tiuspeca agado, aŭ kiuj jam iniciatis tion tian, komunikigi kun mi, por ke ni kune organizu kaj kunordigu pluajn tiajn agadojn.

III. RIMEDOJ

Montriĝis ke la nura propagando por Esperanto — en kiu ajn medio — ne plu trovas la dezirindan eĥon. Ŝajnas, ke la plejmulto el la homoj emas lerni Esperanton nur, se ili jam vidas sufiĉajn progresojn kaj estas certaj pri tujza uzeblo de la Internacia Lingvo en iuj ajn medioj. Estas evidente, ke tiun postulon ni povas plenumi nur kiam ni sukcesos konvinki grandan nombron da homoj pri la neceso lerni Esperanton eĉ sen tiu antaŭkondiĉo.

Kun sukceso ni jam elprovis la peradon de internaciaj kontaktoj inter samcelanoj; ekzemple grupo de poŝtmarkkolektantoj aŭ de kuniklobredistoj povas, kun nia helpo, krei kontakton kun aliaj du similaj en du diversaj landoj. En ĉiuj grupoj okazu samtempaj Esperanto-kursoj por ebligi pli profundajn kontaktojn. Ni nepre insistu pri tiaj reciprokaj kontaktoj inter **minimume tri malsamlingvaj grupoj**, ĉar se estas nur du, povas okazi ke ili prefere lernus la nacian lingvon de la alia grupo! Oni ja ne kredus al ni ke Esperanto donus eĉ en tiu kazo pli da utilo ol la nacilingvo.

La sama vojo estas irebla eĉ ĉiuspecaj sociaj organizaĵoj — kaj eĉ generale en la tuta poresperanta laboro.

IV LABORPLANO

Nia laboro manifestiĝos en 5 etapoj. Por la unua etapo mi nun donas la startsignalon, kaj esperas, ke ni post nelonge vidos la unuajn rezultojn.

1-a etapo

- a) Informi kaj alvoki per ĉiuj taŭgaj rimedoj la esperantistojn en la sociaj organizaĵoj, havantaj la saman intereson aŭ hobion.

- b) Ciu esperantista ano de socia organizaĵo kolektu adresojn de aliaj esperantistaj anoj en la organizaĵo kaj varbu ilin por kunlaboro.
- c) La esperantistoj de la unuopaj sociaj organizaĵoj (samhobianoj ktp.) kunvenu loke, distrikte, lande kaj internacie, por elekti komitaton kaj fiksi laborplanon.
- ĉ) Post fikso de laborplano oni daŭrigu la serĉadon de kunlaborantoj kaj kompletigu kiel eble plej densan reton de kunagantoj mondscale.
- d) La kunlaborantoj intervjuu lokajn, distriktajn, landajn kaj internaciajn estraranojn de la koncernaj organizaĵoj, kaj elstarajn, konatajn samcelanojn — samhobianojn, informadu ilin pri Esperanto kaj ĝia utileco por la disvastigo de la celoj de tiu organizaĵo kaj ĝiaj membroj. Informu ankaŭ pri la mondskala iniciato por enkonduki E-on en tiun fakon. Ili faru informajn prelegojn kaj ekvidu kursojn.
- e) Kunlabore kun la estraroj de la koncernaj sociaj organizaĵoj la kunlaborantoj starigu kolektivajn kontaktojn kun malsamlingvaj grupoj de la sama aŭ samcela socia organizaĵo. Por ebligi la profundecon de la kontaktoj, la partoprenantaj grupoj aranĝu samtempajn esperantokursojn por siaj anoj.
- f) Ciun okazajon en ĉiuj etapo komunikadu al mi (adreso supre), al Esperanto-Gazeto (Lole Ribara 14, Beograd), kaj al nacilingva fakgazeto.

2-a etapo

- a) Kie la statutoj tion permesas, ni kreu esperanto-fakgrupojn en la kadro de la sociaj organizaĵoj en laŭeble plej multaj lokoj, kaj evoluigu en ili tian internacian aktivadon, kiu evidentigos la utilecon de la Internacia Lingvo.
- b) Ni petu Esperanto-paĝon en la bultenoj kaj gazetoj de la organizaĵo unuflanke, kaj aliflanke kompetentuloj kreu decaspektajn fakbultenojn en Esperanto.
- c) Ni ellaboru fakterminarojn, kaj eventuale frazarojn kaj apartajn lernolibrojn por samfakanoj.
- ĉ) Ni pliintensigu la internaciajn kontaktojn inter la samfakanoj kaj stimulu internacian vizitadon.
- d) Ni regule okazigu fakkunvenojn de samfakaj esperantistoj sur ĉiuj niveloj.

3-a etapo

- a) Enkonduki Esperanton en la internaciajn rilatojn de la organizaĵo, skribajn kaj buŝajn.



- b) Stimuli la kreon de faka literaturo laŭ neceso kaj eblecoj.
- c) Per kunlaboro kaj sendado de leteroj kaj artikoloj al la redakcioj konkuri pli kaj pli da paĝoj por Esperanto en la fakaj gazetoj.
- ĉ) Fakanoj esperantistaj per siaj utilaj iniciatoj kaj sindona agado partoprenu la laboron de la estraroj sur ĉiuj niveloj ankaŭ en laboroj ĝeneralaj, kiuj ne rilatas al Esperanto, gajnante tiel la fidon kaj aprezon de samfakanoj.
- d) Fakanoj esperantistoj partoprenu pli kaj pli nombre la internaciajn fakajn konferencojn kaj kongresojn. Ili faru postulojn koncerne Esperanton, sed nur tiom, kiom estas verŝajne akceptebla en tiu difinita momento de evoluo de la kampanjo kaj informiteco de la ceteraj partoprenantoj. Grave estas ekzemple atingi, ke oni permesu diskuton en Esperanto, sed tion oni postulu nur kiam oni estas certa, ke sufiĉe da diverslandaj partoprenantoj uzos tiun rajton en inda formo, kun inda enhavo.

4-a etapo

- a) Proponi enkonduki Esperanton oficiale kiel internacian lingvon en la koncernan fakon: en ĉiujn ĝiajn internaciajn rilatojn, buŝajn kaj skribajn.
- b) Proponi la esperantigon de ĉiuj presaj, cirkuleroj, oficialaj organoj.
- c) Proponi la oficialigon de Esperanto kiel la lingvon de la internaciaj fakaj kongresoj kaj konferencoj, kun eventuala allaso de pluj lingvoj, komence kiel oficialaj, poste nur kiel neoficialaj, kaj fine elimini ilin.

5-a etapo

Post la oficialigo nia tasko ne finiĝis. Sekvos la efektivigo de la decido. Ciu membro de la organizaĵo devas lerni Esperanton. Ĉiuj presaj devas esti bone tradukitaj, ĉiuj surskriboj en lokoj, kie diverslingvaj personoj trafikas, esperantigitaj. La faka literaturo traduka kaj originala devas konstante ampleksiĝi.




— Li ankoraŭ ne parolas Esperanton. Gis nun li verkis nur kelkajn poemojn.

Paperkanonoj 18

- 137. Kurverwaltung Millstatt, A-9872, Karintio, Aŭstrio (petu turisman prospekton en Esperanto)
- 138. Nordostschweiz. Verkehrsvereinigung, CH-900 — St. GALLEN, Svisujo. — (petu turistprospekton pri la regiono)
- 139. Baranya megyei Idegenforgalmi Hivatal, Szécsényi tér 9, PÉCS, Hungarujo (turistoficejo, petu prospektojn pri Pécs, Harkány, Mohács, Abaliget, kaj petu informojn pri festoj kaj turist-aranĝoj).
- 140. KLM — Propaganda departemento, Leidsplein 1—3 AMSTERDAM, Nederlando (Petu informon pri difinitaj vojaĝoj, aerlinioj, specialaj flugoj al foraj landoj)
- 141. NAVIP, Sime Solaja 5, ZEMUN, Jugoslavio (Vinproduktejo; petu informojn pri ilia malnova prunbrando, pri la produkto »Milion«, pri tio ĉu ili eksportas al via lando, kaj kie oni povas akiri)
- 142. Turistbyran, Kyrkogatan 6, JÖNKÖPING, Svedujo (petu prospekton en E. kaj informojn pri eblecoj somerumi ĉe lago Vättern)

KVARONJARGENTO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ



La majesta konstruaĵo de UNO en Novjorko, centro de la politiko de la mondo dum la lasta kvaronjarcento.

Antaŭ 25 jaroj la mondo atingis la finon de la plej terura kaj plej neniiga milito en la historio de la homaro. La homoj estis konsternitaj kaj terurigitaj pro ĝiaj sekvoj. Tio kreis tre favoran situacion por la fondo de potenca internacia organizaĵo kun la tasko savi la estontan pacon, malhelpi novajn militojn, restarigi la fidon al la homaj rajtoj, stimuli la ŝtatojn respekti la internaciajn devojn, helpi la socian progreson kaj plialtigon de la vivnivelo en plena libero.

La Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj neniam estis planita kiel super-

ŝtata aŭtoritato. Ĝi estis kaj restis mekanismo por la kunlaborado inter suverenaj ŝtatoj-membroj por la solvado de internaciaj problemoj.

Dum la jubilea kunsido de la Asembleo de UNO dediĉita al ĝia 25-jara ekzistado, en oktobro ĉi-jara kunvenis sur la bordo de Istrivero en Novjorko la reprezentantoj de la plejgranda parto de la homaro kun la deziro rehavigi al la organizaĵo la ĝeneralan fidon, kaj doni novan vivoforton al la principoj sur kiuj baziĝas ĝia Ĉarto. La spertoj de la pasintaj 25 jaroj altrudas tiun bezonon.

EKDE SIA FONDIGO EN 1945 GIS SIA »ARĜETA JUBILEO« LA NOMBRO DE LA ŜTATOJ-MEMBRO PLIGRANDIĜIS DE 51 AL 126. PLI OL 2,5 MILIARDOJ DA HOMOJ DE CIUJ KONTINENTOJ. ESTIMAS LA CARTON DE U.N.O.

La politikaj blokoj ekzistas, sed malfacile vivtenas sian ekziston, ĉar la ideo el kiu tia divido fontas, perdis la aktualecon. Antaŭe la malgrandaj nacioj alkreiĝadis al la blokoj, nun ili klopodas dekroĉiĝi.

La mondo ankoraŭ estas dividita, sed la mondpaco estas ĉiam pli kaj pli nedividebla. Estas ja evidente kiel loka konflikto — ĉu en Malproksima Oriento aŭ ĉirkaŭ Suez — endanĝerigas la pacon de la tuta homaro. Ĉiuj militoj montras klare, ke jam ne ekzistas avantaĝoj akireblaj per armiloj. La mondo ja funde ŝanĝiĝis dum la lastaj du kaj duono de jardekoj. Apud la granda teknika progreso ankaŭ la ideoj evoluas. La homaro integriĝas. Jam ne temas pri konflikto de sociaj sistemoj, klasoj aŭ rasoj. Pli kaj pli temas la konflikto inter progresemaj kaj malprogresemaj homgrupoj kaj unuopuloj.

Paradokso de nia tempo estas ke la geniaj iloj, kiujn la homo elpensis por pliperfektigi sian vivon, povas egale detrui lian mondon. »La mondo aŭ estos pli bona, aŭ ĝi ne ekzistos«, diris Bertrand Russel (Rasel). Eble la nuna momento estas bona por rekonsciigo. Ĝis nun ĉiuj klopodis laŭeble plej multe profiti de UNO, kaj plej malmulte doni al ĝi. Nun la membro-ŝtatoj komencas rekoni siajn erarojn.

Dum la jubilea kunsido de UNO, kiun ĉeestis ŝtatestroj aŭ specialaj senditoj de ŝtatestroj el 127 ŝtatoj, tri deklaroj estas akceptitaj.

Laŭ la unua la membroj-ŝtatoj sin devigas al aktiva paca kunekzistado kun ĉiuj landoj, senkonsidere al ilia politika, ekonomia aŭ socia sistemo, kaj fari ĉion eblan por la konservo de la internacia paco en la mondo.

Per la dua Deklaro la membroj-ŝtatoj akceptas la principojn de internacia konduto sen minacoj kaj perforto, pri paca solvado de ĉiuj konfliktoj inter ŝtatoj, kiel egalrajtaj suverenaj unuoj, en kies aferojn neniu alia unuo rajtas enmiksiĝi.

La tria Deklaro ekfunkciigis la »duan dekjaron de evoluo«, per kiu la pli riĉaj kaj pli evoluintaj landoj sin devigas materie helpi la pli rapiidan evoluon de la evolulandoj.


Estas akceptita plua dokumento pri la elimino de la restaĵoj de koloniaj sistemoj.

Ke ne sufiĉas deklaroj, se ne sekvas ilin adekvataj agoj, emfazis la ĝenerala sekretario de UNO, U Tant: »Malmulte da tempo restis al ni por renovigi la fidon kiun havis la popoloj kiam ili kreis la organizaĵon. Ni ne rajtas kontentiĝi per malrapidaj kaj partaj rezultoj.«

J. G.

KONFERENCO EN LUSAKO

Preskaŭ la duono de landoj de la tuta mondo komence de septembro kunvenis en Lusako, ĉefurbo de la afrika ŝtato Zambio. Multaj landoj estis reprezentataj per la ŝtatestroj. La ĉeestantoj ne kunvenis por proklami sian neŭtralecon, sed substreki la firman volon de siaj popoloj batali por la sendependeco, egalrajteco kaj pli bona kaj feliĉa vivo de ĉiuj popoloj en la mondo. La konferencon (trian de eksterblokaj ŝtatoj) partoprenis jenaj landoj:



Flirtas la flagoj de la eksterblokaj landoj en Lusako.

Afganujo, Algerio, Botsvano, Burundio, Kameruno, Centrafrika Respubliko, Cejlono, Ĉado, Popola Respubliko Kongo, Demokrata Respubliko Kongo, Kubo, Cipro, Etiopio, Ganao, Gvineo, Gvajano, Hindujo, Indonezio, Irako, Gabono, Jamajko, Jordano, Kenjo, Kuvajto, Laseo, Libano, Lesoto, Liberio, Libio, Malajzio, Malio, Maŭritanio, Maroko, Nepalo, Nigerio, Ruando, Senegalo, Sieraleono, Singapuro, Somalio, Suda Jemeno, Sudano, Svazilando, Sirio, Tanzanio, Togolando, Trintobago, Tunizio, Ugando, Uaro, Jemena Araba Respubliko, Jugoslavio, Zambio.

Kiel observantoj ĉeestis Argentino, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Peruo, Venezuelo, Suda Vietnamo kaj Barbadoso.

La ĉeestantoj diskutis pri ĉiuj plej gravaj problemoj de la nuntempa mondo. Oni kondamnis ĉiun perfor-

tan enmiksigon en la aferojn de aliaj landoj, ĉiun diskriminacion rilate al la raso, religio aŭ ideologio. La tria konferenco de eksterblokaj ŝtatoj akcentis ke ĉiu lando devas kaj rajtas decidi pri sia sorto kaj vivmaniero.

La Konferenco proklamis kelkajn deklariojn en tiu senco. Estas menciinde ke la Unuigintaj Nacioj decidis ke la jubilea kunveno de la tutmonda Organizaĵo la 24-an de oktobro 1970-a akceptu la Deklaracion de Lusako pri la amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj.

GRAVAN REZOLUCION PROKLAMIS LA KONFERENCO

La politiko de eksterblokaj ŝtatoj — tekstas la Rezolucio — aperis kiel rezulto de la firma decido de novaj sendependaj ŝtatoj konservi sian sendependecon kaj laŭlegajn rajtojn de siaj popoloj. La kreskado de la nombro de eksterblokaj ŝtatoj kiel larĝa internacia movado, kiu superas la rasajn, regionajn kaj aliajn limojn, estas esenca parto de la signifaj ŝanĝoj en la strukturo de la internacia unuiĝo.



Ce la kunvenoj de la eksterblokaj landoj, same kiel en UNO kaj aliaj internaciaj kunvenoj, grava problemo ankoraŭ ne ricevas la necesan atenton: la problemoj de lingvo necesas por vera interkompreniĝo. Apud la partoprenantoj ĉiam sidas interpretistoj kiuj klopodas pli aŭ malpli fidele interpreti la diritaĵojn.

La partoprenantoj de la Konferenco konfirmis la rajton de ĉiuj landoj esti egalaj kaj aktive partopreni la internaciajn aferojn, respektaĵon de la suverenecon kaj tenitoria integreco de ĉiuj landoj.

La eksterblokaj landoj decidis klopodi estonte plifortigi la rolon kaj efikan agadon de la Unuigintaj Nacioj.

La Konferenco en Lusako havas trioblan signifon:

Tiun ĉi konferencon partoprenis preskaŭ la duono da ŝtatoj de la nuntempa mondo.

La unuan Konferencon en Beogrado partoprenis 25 ŝtatoj, la duan en Kairo — 47, kaj la trian en Lusako — 63. Tio montras evidentan kreskon de la ideoj kaj de la influo de la eksterblokaj ŝtatoj kaj de aktiva kunekzistado.

Milionoj da homoj kiujn reprezentis la Konferenco en Lusako alportas al la internacia vivo novan moralan forton.

La prezidanto de Zambio doktoro Kenet Kaunda substrekiis en sia parolado ke per tiu ĉi renkontigo finiĝis la erao de la malfacileco pri la eksterblokaj landoj.

Ĉiuj ĉeestantoj estis konsciaj ke nun komenciĝas nova periodo de konkreta agado por la efektivigo de la eksterblokaj landoj.

Unu el la fundamentaj celoj de la eksterblokaj landoj estas la certigo de paca kaj sendependeca evoluo de ĉiuj kiuj apogas tiun politikon.

La Konferenco akceptis ankaŭ Rezolucion pri senarmigo, pri la malaprobo de la produktado de atomarmiloj kaj nukleaj provoj, kaj pri la malaprobo de kemiaj kaj bakteriologiaj armiloj.

La Konferenco akceptis rezolucion pri foriro de ĉiuj fremdaj armeoj el Vietnamo kaj la arabaj landoj.

La grandaj ŝtatoj el Eŭropo kaj Azio, ne partoprenantaj la konferencon sendis favorajn mesaĝojn.

I. A.

KION DONACI
AL AMIKO?

ABONIGU LIN AL

esperanto
gazeto

ESPERANTISTOJ ĈE FINNLANDA ĈEFMINISTRO

Kiel informas la 82-a numero de la organiza bulteno de Mondpaca Esperanto-Movado en Sofia la 24-an de oktobro 1969 vespere en la registara palaco »Vranja« okazis renkonto de s-ro Mauno Koivisto, finnlanda ministro-prezidanto, oficiale gastanta en Bulgarujo, kun delegitaro de bulgaraj esperantistoj gvidataj de la prezidanto de Mondpaca Esperanto-Movado.

Al s-ro Koivisto, kiu tre afable akceptis la delegitaron kaj amike interparolis kun ĝi, estis proponita speciala belarta adreso en bulgara kaj Esperanto kun jena enhavo:

Al Sinjoro

Mauno Koivisto, ministro-prezidanto de Respubliko Finnlando

Estimata Sinjoro Koivisto,

Via vizito al nia lando estas precipe ĝojiga por la bulgaraj esperantistoj, ĉar Vi venas el lando, kiu en la kuranta jaro estis dommastro de la 54-a UK de Esperanto. Multaj bulgaraj esperantistoj povis konatiĝi kun la belaĵoj de via lando kaj krei rektajn kontaktojn kun siaj kolegoj el Finnlando por reciproka interkonatiĝo kaj proksimiĝo!

Dank' al la internacia lingvo Esperanto ni povis ekkoni Vian nacian eposon Kalevala, kaj ankaŭ la verkojn de finnlandaj mastroj de la plumo, kiel Aleksis Kivi, Johannes Linnankoski, Juhana Erkkö kaj aliaj.

Ni tre alte taksas kaj gratulas la iniciaton de Via registaro por stabiligo de la kolektiva eŭropa sekureco

BONVENON EN AŬSTRUJO! Jus aperis turisma faldfolio pri Aŭstrujo, eldonita de Österreichische Fremdenverkehrswerbung, A-1010 WIEN, Hohenstaufengasse 3, kunlabore kun Aŭstria Esperanto-Movado, A-1010 WIEN, Hofburg. De iu ajn el ili oni povas peti la senpagan sendon de tiu ĉi ĉarma, informa kaj bonege kolorpresita informilo.

kaj konservo de la paco en Eŭropo kaj en la tuta mondo, ĉar ni scias, ke nur en paco povas disflori la kunlaborado kaj interkompreniĝo de la popoloj.

Ni petas Vin transdoni al la finnlandaj geesperantistoj niajn plej sincerajn bondezirojn por novaj sukcesoj de la finna popolo en la batalo por paco, amikeco kaj socia progreso.

Vivu la bulgara-finna amikeco!
Sofia, la 24-an de oktobro 1969

SEKRETARIO: (s) Iv. Sarafov
PREZIDANTO: (s) N. Aleksiev

NATURAMIKOJ EN NIGRA ARBARO

Komence de aŭgusto ĉi-jara dum unu semajno 110 SAT-anoj postkongresis en la TAN-domo en Kniebis en Svarcvald, kaj en vilaĝaj domoj, ĉar la loko ne sufiĉis en la domo. La tempo estis plenigita per interesaj ekskursoj tra tiu belega regiono, vizitoj al vilaĝoj, fabriko, akvofalo kaj aliaj interesaĵoj kiel ankaŭ al la urbo Freudstadt kaj al subĉiela muzeo de antikvaj vilaĝdomoj. Abundis ankaŭ amuzaj, ŝercaj kaj ludaj vesperoj, kaj prelego.

(Laŭ G. v. d. Horst)

JUNULARA KORESPONDSERVO

Pola Esperanto-Junularo kaj Studenta Rondo Scienca de Esperantistoj en Torun (str. Mickiewicza 6/10) gvidas internacian korespondservon por plifaciligi al gejunuloj kiuj finis E-kurson, ekuzi la lernitan lingvon.

Ĉiu kiu alsendas sian adreson, povas ekhavi 8 internaciajn kontaktojn: li mem ricevos adresojn de kvar gekorespondemuloj, kaj lia adreso estos sendata al aliaj kvar. Tiu ĉi servo estas senpaga.

(Laŭ inf. de Marek Lassak)

KUNVENIS RUMANAJ ESPERANTISTOJ

La 29-an kaj 30-an de Aŭgusto 1970 okazis en la banloko Covasna (Rumanujo) tutlanda esperantista renkontiĝo. La 144 partoprenantoj el 26 urboj decidis starigon de »RUMANA KUNORDIGA ESPERANTO KOMITATO«, kies celoj estas kunordigi agadon de Esperanto-rondoj funk-

ciantaj ĉe Kulturdomoj, ebligi ilian spertintersaĝon kaj apogi la estiĝon de novaj kulturdomaj Esperanto-rondoj.

La Komitato elektis plenuman buron.

Prezinanto: Jozefo Petrin, ĝenerala sekretario: Maria Vitályos.

PRI COMENIUS EN ESPERANTO

Sino Jana Čichová transdonis al la Stata Pedagogia Instituto en Praha jarkolektojn de diversaj Esperanto-gazetoj, en kiuj aperis ŝiaj artikoloj pri Comenius, kaj ricevis pri tio dankleteron de tiu instituto. La jarkolektoj estos ankaŭ ekspoziciitaj en Valdsejn-palaco en Prago.

(Laŭ inf. de J. C.)


ESPERANTO-TURISMO TRAVIVIS AZION

Estus malfacile priskribi en nia limigita spaco ĉiujn travivaĵojn kaj interesajn renkontojn kiujn la partoprenantoj de la vojaĝo »Oriento Vokas« havis en Japanujo, Honkongo kaj Hindujo.

En la centro de la vojaĝo troviĝis nepre la unika travivaĵo kiun prezentis EKSP0 70. Dekoj da strangaj, mirindaj pavilonoj kaj salonegoj. Centmiloj da ekspozitaĵoj.


Ni vidu nur unu el ili, ligitan al la estonto de la homoj. Ĝi nomiĝas LOGKAPSULO.

Ĝi estas ekspoziciita en la sekcio por la familio en la pavilono Sanĵo, kaj koncernas la estonton de loĝado. La baza ideo de la loĝkapsulo estas: »Se la homoj bezonas propran loĝejon, kial oni ne ĝuu ankaŭ sian privatan vivon laŭplaĉe en aparta kapsulo plene funkcia, kaj kun vere pura aero?«



La kapsulo estas globforma kun diametro de 2,5 m. Ĝi estas konstruita el antaŭstreĉita maso. En ĝi troviĝas faldebla lito por unu persono. La interna temperaturo kaj la humido aŭtomate estas kontrolataj. Premante butonon de la fridujo oni facile akiras botelon kun biero aŭ iun frukton, dum per premo sur alia butono la televidilo por kolorbildo transformiĝas en videofonon. La televidilo povas esti uzata ankaŭ kiel indikato kun klavaro por la videofono kaj elektrona kalkulilo.

La loĝkapsulo povas esti lokigita kie ajn — ekzemple sur arbo aŭ neglata tereno. Ĝi havas propran fonton de energio.



La pupoj ree ekparolis

De la 5-a ĝis la 11-a de oktobro ĉi-jara okazis PIF-3, La Tria Pupteatra Internacia Festivalo, kun la sola laborlingvo Esperanto, en Zagreb, Jugoslavio.


La 27 spektakloj okazintaj en du zagrebaj salonegoj kaj en salono de la urbo Sisak, ĉarmigis la 8.000 spektantojn, kaj denove alportis al ili la mesaĝon de la beleco kaj utileco de la internacia lingvo Esperanto. Multaj el la spektantoj ekdeziris lerni la lingvon ĝis la venontjara festivalo, kaj urbaj aŭtoritatoj decidis pli firme kaj pli malavare subteni tiun jam prestiĝan kaj gravan kulturalan eventon.

Tri ĵurioj prijuĝis la prezentaĵojn. Faka ĵurio, kiun prezidis la konata itala fakulino s-ino Maria Signorelli, veninta el Romo, kun partopreno de la artkritikisto Milan Ĉeĉuk, kaj Boja Kukulja, pupartisto, ambaŭ el Zagreb. La lingvan ĵurion formis Tibor Sekelj, Emilia Lapenna, Zvonko Rehorjĉ, Preben Bagger kaj Roger Imbert, dum la infanan ĵurion partoprenis Mišel Imbert el Zagreb, Margarita Rieth el Budapeŝto kaj la du etaj fratoj Alessandro kaj Flaviani Corrado el Milano.

La unuan fakan premion gajnis la belega spektaklo »La Museto kaj la Pupo«, de Alek Popovici, prezentita de la Ŝtata Pupteatro de Konstanca, Rumanujo. La bonan tradukon de Josefo Petrin prezentis unuarangaj geaktoroj, elstare reĝisorite. Krom la prezentaĵo kiel tuto, aparatan premion gajnis »la museto«, kiel la plej ĉarma kaj plej elstara figuro de la tuta festivalo. La spektantoj de PIF-4 havos — laŭ ĝia regularo — la bonŝancon denove vidi la saman spektaklon, kiel inaŭguran prezentaĵon, en oktobro 1971.

La duan premion de la faka ĵurio, la unuan de la lingva kaj la premion de la infana ĵurio gajnis la Pupteatro el Koŝice, Ĉeĥoslovakio, kiu post la ripeto de la pasintjara gajninto, »Budulinĉo«, prezentigis ankaŭ per nova spektaklo »La Scivola Elefantido« de N. Cassanova

La fakkunsido de pupistoj dum PIF-3



kaj L. Dvorsky, elstare esperantigita de J. Zavra.

»Kaŝperlo Bakas Kukoĵoj« estis solprezentaĵo de s-ro Edgar Perseke el Aachen (Aĥen), FR Germanujo, kies klasikstila prezentaĵo meritis la trian premion de la faka ĵurio. Samtempe varman aplaŭdon kaj florumagojn gajnis ankaŭ la solprezentaĵo de s-ro Roberto Banky el Budapeŝto, kiu montris tri fabelojn per lerte moviĝantaj ombrofiguroj, kaj la spektaklo »Kiu ne scias sian nomon«, prezentita de la Pupteatro de Instruistinoj ĉe la Centra Domo de Geinstruistoj en Sofia, Bulgarujo. Precipe varman akcepton ricevis la prezentaĵo de »La Leontodo«, de Sunĉana Skrinjariĉ, prezentita de la Zagreba Pupteatro, ekster Konkurenco.

Dum la festivalo okazis fakkunveno kiun partoprenis ĉ. 50 pupistoj diverslandaj, por pritrakti la temon »La Pedagogia Valoro de la Pupteatroj«. Sub la prezido de T. Sekelj, la tuta diskuto okazis en Esperanto, kaj kiam iu parolis nacilingve, liaj vortoj estis tradukataj tuj al Esperanto. Krom la direktoroj kaj membroj de la partoprenantaj trupoj kaj iliaj instruistoj de Esperanto, ĉestis ankaŭ s-ino Bojena Serova, reprezentantino de la Kulturministerio de Slovakio, s-ino Maria Signorelli, konata fakulino kaj prezidanto de la Internacia Asocio de Pupteatroj.



Ombrobildo el la prezentaĵo de R. Banky el Budapeŝto.

dantino de la Itala sekcio de UNIMA el Romo, la artkritikisto Milan Ĉeĉuk kaj aliaj.

La fakkunvenon malfermis referaĵoj de Milan Ĉeĉuk el Zagreb kaj de la kolektivo de la Bulgaraj pupistinoj-instruistinoj, al kio sekvis vigla kaj fuktodona diskuto.

Geaktoroj el la pupteatro de Konstanca, gajnintoj de la Unua premio.


Okazis akcepto flanke de la urbestro kaj s-ino Mira Krizmaniĉ, Prezidantino de la Kulturkleriga Konsilantaro de la urbo Zagreb, la protektantino de la Festivalo, kiu apud UNIMA kaj IOE akceptis flanke de la urbo Zagreb patroni tiun ĉi jam tradician kulturalan eventon, kiun tiel eminente organizas la Instituto por Kulturklerigo de la urbo Zagreb, ĝia direktorino, s-ino Ljiljana Antonjeviĉ, ĝia sekretario — la ĉeforganizanto — Zlatko Tiŝljariĉ, kaj la membroj de la Strudenta E-Klubo de Zagreb.


Por momento ni malatentu kion ni esperantistoj opinias pri tiu ĉi elstara evento, kaj aŭskultu la opinion de la pupistoj, kiun antaŭ unu jaro eldiris Prof. d-ro Jan Malik, ĝenerala sekretario de UNIMA:

La originala ideo en la internacia partoparto utiligi Esperanton kiel lingvon por interkompenigo kaj arta esprimado, montriĝis tre sukcesa. Sendube estas nemezurebla la avantaĝo de ĝia uzo inter pupistoj, precipe en ĝiaj simpozioj, pro ĝia katalizatora humana rolo.

Jam nun estas fakto, ke PIF estas insitucio de ne nur arta sed ankaŭ politika signifo. Ambaŭ ĝisnunaj festivaloj donis pli ol favoran bilancon por la progreso de la puparto, kaj aldonas al la internaciaj kontaktoj en la sfero de kulturo la dimension de pli facila alproksimiĝo de diversnaciaj artistoj.

Sceno el la »Scivola Elefantido«, per kiu la Pupteatro el Koŝice gajnis la favoron de la infana kaj la lingva ĵurioj.





RECENZOJ

PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO.

Cefa aŭtoro prof. Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto. Eldonanto SAT, 67 avenue Gambetta, Paris-20. — 1344 paĝoj, formato 148 × 210 mm. — Prezo inkluzive sendkostojn US \$ 26,10. Pagoj en Francujo al poŝtkonto 9535.36 Paris je nomo de SAT-Paris, alilande ĉu rekte al poŝtkonto 20 049 Zürich — kun plena adreso de SAT-Paris, ĉu pere de kutimaj revendistoj.

La vere impona volumo, kun la longa listo de eminentaj kunaŭtoroj, impresas tre serioze. Se oni analizas la enhavon kaj la aplikitajn metodojn, la impresado tre forte konfirmigas.

En la Generala Antaŭparolo, post la »Historio de tiu ĉi vortaro« venas »Celoj kaj Metodo« kaj »Apartaj Enkondukoj« de 4 kunaŭtoroj kaj »Arangado de la Vortaro« kun listo de vinjetoj, mallongigoj, signoj kaj kemiaj simboloj. Ĉe la fino estas tabeloj de mallongigoj ĝenerale uzataj, de societoj k.s., de simboloj de aŭtomobila nacieco, de oftaj mallongigoj en medicino kaj biologio, de la geologiaj tempoj, de la taksonomiaj unuoj de botaniko, de la ĉefaj sistemataj kategorioj kaj grupoj en zoologio, kaj de la prahistoriaj kulturperiodoj. Laste venas 30 bildplatoj kun samnombraj paĝoj de klarigoj kaj post ili alfabeto indekso de la vortoj bildigitaj sur la platoj, kun indiko de la plato kaj numero de la koncerna detalo.

PIV estas ne nur multe pli riĉa ol PV laŭ la nombro de la vortoj, sed ankaŭ laŭ la amplekso de la klarigoj kaj abundo de ekzemploj, kaj multe pli moderna laŭ la difinoj de la kapvortoj kaj laŭ la lokigo de la derivaĵoj, kiuj nun estas pli facile troveblaj, ĉar la kunmetitaj vortoj estas troveblaj sub la ĉefradiko. Estas bone ke en la vortaron eniris amaso da propraj nomoj, inter ili ankaŭ geografiaj.

Kelkajn riproĉetojn mi tamen volas starigi:

1) Se en lingvo kun fonetika ortografio oni tiun principon ne aplikas ĉe propraj nomoj, la lingvo neniam kapablos transpreni la rolon de sola internacia lingvo, ĉar la diverslingvaj esperantistoj tamen devos krom la Esperanta ortografio lerni ankaŭ la plej diversajn ortografiojn de ĉiuj aliaj lingvoj, ĉar ne ekzistas du lingvoj kun sama ortografio. PIV uzas nur literojn de Esperanta alfabeto, tamen ofte konservas etimologian ortografion tie kie la nomo ne havas literojn mankantajn en E-alfabeto (w, x, y, ä, ö, ü, ĉ, ĉ, ĉ, ktp), ekz. Idaho (anst. Ajdaho), Iovao (anst. Aĵovo), dum fonetike estas skribitaj Masaĉuseco, Markso, Montekarlo, Sanhajo. Kelkaj nomoj estas parte esperantigitaj, sed en ili estas konservitaj literoj kiuj sonas alimaniere, ekz. Mozarto (Mocart — familiajn nomojn oni ne rajtas ŝanĝi aldonante o-finaĵon), Seviljo (Seviljo), en aliaj estas konservitaj duoblaj konsonantoj, ekz. Sommo (aŭ Somo aŭ Somme), Mekko (aŭ Meko aŭ Mekka — cetere la popolo tie ne uzas latinajn literojn). Mi ne komprenas kial la nomo Madjaro ne estas fonetike skribite Maĝaro, se la etimologia ortografio Magyar estas forĵetita. Same mi ne komprenas de kie venas la nomo Messo kiu etimologie estas Metz kaj fonetike Mec — almenaŭ tie ne devus esti duobla konsonanto! Kial la nomoj de ĉinaj provincoj plejparte ne havas o-finaĵon? Ĉi tie mi devas mencii ankaŭ ke la ĉefa redaktoro ne akceptis multajn nomojn en formo proponita de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj, kies kunprezidanto estas li mem, ekz Adriatiko (Adria maro aŭ Adrio), Velingtono (Velintono), Adelaido (Adelajdo) ktp. Slavonio ne estas »malnova nomo de Kroatujok«, sed parto de Kroatujok.

2) Duoblajn konsonantojn, precipe ĉe komunaj vortoj, mi ne aprobus, eĉ se iam uzitaj de Zamenhof, kiel villo anstataŭ la jam enradikigita vilao, aŭ brutte (kuntare), aŭ vatto por watt (eble oni povus ĝin skribi majuskle Vato por distingi de vato).

3) Mi ne povas akcepti ke Aprilo kaj Septembro estas propraj nomoj kaj mardo kaj vendredo ne, ĉar ambaŭ ripetigas — unu ĉiujare, alia ĉiusemajne. La nomojn de la monatoj mi skribus minuskle.

4) Ni atendis ke PIV havos ilustraĵojn en la teksto mem. La formo de bildplatoj kun apudaj nomoj indikitaj per numeroj, estas multe pli efika, ĉar oni multajn vortojn povas trovi sur la sama bildo kune kun iliaj interrilatoj; des pli, ĉar post ili aperas alfabeto indekso de ĉiuj bildigitaj vortoj. Tamen estas granda manko, ke oni nenian indikon metis ĉe la koncernaj vortoj en la vortaro mem, ke tiuj vortoj troviĝas ankaŭ sur iu bildplato. Mi rekomendas, ke oni en la dua eldono starigu ĉe ĉiu vorto la samajn signojn kiel en la indekso (ekz: XVI B 28), aŭ simple nur iun signon, ekz. B, ke la uzanto de la vortaro sciu ke ekzistis ankaŭ bilda klarigo, aŭ meti la Romanan numeron de la bildplato.

Se oni tiel grandan vortaron volus recenzi, oni devus ĝin fundamente trastudi, kaj tiu laboro forprenus tiom da tempo, ke la recenzo verŝajne aperus post la disvendo de la verko. Pro tio ni devas limigi al supraĵa prijuĝo, kaj se ni eĉ post supraĵa trastudo ne trovas pli da riproĉoj, tio signifas ke la vortaro estas bonega. Ĝi estas la unua Esperanta vortaro kiu enhavas krom la ĝeneralaj vortoj ankaŭ ĉiujn teknikajn kaj sciencajn vortojn. Krome ĝi ne estas nur vortaro, sed ankaŭ informilo pri botanika kaj zoologia sistemoj, ĝeneralaj mallongigoj kaj mallongigoj de iamaj kaj nunaj Esperantaj organizaĵoj kiuj aperas en la literaturo ofte sen klarigoj; eĉ listo de simboloj de aŭtomobila nacieco (bedaŭrinde ne kompleta). Kvankam la prezo estas nekutime alta kaj la esperantistoj kutime malriĉaj, ni rekomendas al ĉiuj kiuj okupiĝas aŭ volas okupiĝi pri la lingvo mem, nepre havigi tiun ĉi unikan, neanstataŭigeblan verkon por sia biblioteko.

Sekanto

★ RAVENNA, esperantlingva gvidlibro, eldonita de Azienda Autonoma di Soggiorno e Turismo (Via XIII Giugno 2, Ravenna, Italujo). 32 paĝa broŝuro, kolore ilustrita sur bonega papero. Ke tiu broŝuro estas jam la kvara eldono, montras ne nur ĝian altan kvaliton, sed ankaŭ ke la eldonintoj — kaj precipe ĝiaj esperantistaj helpantoj — lente uzis la broŝuron.

★ RIMINI, riviera. Nacilingva ilustrita faldfolio, kun enmetita folio en Esperanto. Eld. Azienda di Soggiorno, Rimini, Italujo.

★ KONGRESLIBRO de la 22-a Esperanto Kongreso de IFEF (16—22 majo 1970, Rimini, Italujo). 56-paĝa, ilustrita, sur bonega papero, sub redakto de D. kaj G. Gimelli. Malofte fakkongreso havas tiel altkvalitan kaj informoplenan kongreslibron.

★ KONGRESA LIBRO de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto, 1.—8. 8. 1970. Vieno. 160 paĝoj, eld. UEA.

Post sciigoj pri la kongresurbo kaj kongreslando sekvas dulingva frazaro, programo kaj aliaj utilaj informoj kaj listo de 1591 aliĝintoj al la Kongreso.

★ EN ITALIO POR VIAJ RENDEVUOJ KUN LA SUNO — faldfolio de la Italaj Ŝtataj Fervojoj, kun koloraj bildoj.

★ BOLOGNA — faldfolio kun urboplano, plene en Esperanto, dukolora. Ĝi enhavas multajn utilajn sciigojn por vizitantoj de tiu interesa itala urbo. Eldono de la turisma oficejo: Ente Provinciale per il Turismo, BOLOGNA, Italujo.

★ BOLOGNA — broŝuro kun multaj vidaĵoj kaj la plano de la urbo. Eldonis ĝin la sama oficejo kiel supre.

★ NASKIGATESTO DE CASTEL SAN PIETRO TERME — tre bele, kolore presita broŝuro pri tiu kastelo el la 13-a jarcento. Eldonis: Azienda Autonoma di Cura e Soggiorno, San Pietro Terme, Italujo.

DEKJARA JUBILEO DE PRIMOŝTENO



Gaja grupo de esperantistoj en Primoŝteno dum julio 1970. (Foto F. Smerdel)

Primoŝtena tendaro por 10 jaroj kontrakte garanti- ita al la tutmonda esperantistaro

Antaŭ 10 jaroj t.e. en la jaro 1961 la grupo de junaj zagrebaj astronomoj gvidataj de la direktoro dro Gabro Divjanoviĉ proponis sur la duoninsulo Raduča apud la tiama malgranda fiŝista vilaĝo Primoŝten konstrui ĉemaran »Esperantujo«.

Sen ia ajn turisma sperto kaj sen iaj materiaj rimedoj, la junulara volo kaj amo sukcesis starigi modestan tendaron, kiu helpe de loka Turisma societo kun prezidanto Marko Skorin kaj la enlandaj turismaj instancoj elkreskis en modernan kampadejon por renkontiĝo de la esperantistoj.

La kampadejo rapide kreskis sed la financa kaj ekonomia politikoj donis al la evoluo neatenditan direkton. Unue elkreskis tri pavilonoj, poste la unua hotelo (Raduča), tiam dua (Zora), tria (Slava) kaj la kvara (Adriatic) kun la necesa plej moderna ekipaĵo. Sekvis moderna luksa restoracio kaj vendejo-memservado. Establitaj estis ludejo por malgranda piedpilkulado, tenisludejo, kegloludejo kaj minigolfo.

Do, aperis granda Gulivero en la esperantista Lili-putlando, kaj situacio, senespera. En la pasintjara Heroldo, n-ro 16 estis prezentita intervjuo kun la nuna ĝenerala direktoro Marko Skorin kaj la belga s-ano Roger Van Humbeeck, kiu estas tre interesa kaj pensiga, ĉar montriĝis intenco por modernigo de Esperantujo per aldono de 3 pavilonoj kaj konstruo de »bangaloj«, sed nature kun duoble pli multekosta restado. — Feliĉe, ĉio restis nur ĉe vortoj.

Malgraŭ grandega ĉirkaŭa ŝanĝo, la esperantista tendaro restis »kara oazo« en la maro de la monelito. Sed, la esperantistoj kvazaŭ iom forgesis sian dorlotajn, kaj la vizitoj ne amasas, sed la ekonomiaj leĝoj estas senkompataj.

Kroacia Esperanto-Ligo kompreninte la situacion klopodis ion entrepreni por helpi en la afero. Tiuce-

le estis okazigitaj tri interkonsiliĝoj kun la reprezentantoj de la entrepreno, kiuj fine rezultigis: kontrakton inter la Ekonomia gastiga entrepreno Primoŝten kaj Kroacia Esperanto-Ligo pri konservo de la nunforma esperantista tendaro (plue Somerumejo) por pluj 10 jaroj. La entrepreno transprenas la tutan zorgon pri la konservado de la tendoj kun 100 litoj kaj certigas la necesajn financajn rimedojn, Kroacia Esperanto-Ligo transprenas la takson per trafa informado kaj varbado, klopodi ke la somerumejo estu dum la tuta sezono kontentige vizitata de la esperantistoj.

Estas transprenita granda kaj respondeca tasko, pro kio Kroacia Esperanto-Ligo turnas sin al ĉiuj esperantistaj institucioj, organizaĵoj kaj al la unuopaj esperantistoj por la necesa apogo kaj kunlaboro.

La sorto de la Somerumejo Primoŝten kuŝas nun tute en la manoj de la esperantistoj kaj la baldaŭa estonto pruvos, ĉu ni estas kapablaj konservi tiun atingajon, unikan en la mondo, kiu estonte estos tiom pli bela kaj alloga, kiom ni tion meritos per nia multnombra vizito.

Zvonko Rehorić



Internacia amikeco en Primoŝteno, en julio 1970 (Foto A. Fernandez, Gent)

PREMIO-FERIO EN ABALIGET

Kiel nova abonanto de ESPERANTO-GAZETO dum la kuranta 1970 jaro mi partoprenis ĝian Grandan Konkurson. La bonŝanco favoris min, pro kio mi gajnis inter la 6 donancitaj premioj la 4-an: 10-tagan partoprenon en la 3-a IREN (18—28 de julio 1970) en Abaliget apud Pécs (Peĉ), Hungarujo.

Do, kiel premiito redakcia mi alvenis la 18-an de julio en Abaliget afable akceptita de la organiza komitato de 3-a IREN gvidata de sino Elizabeta Pallós kaj s-ro d-ro Miklós Gáboros.

Abaliget situas en la arbara regiono de montaro Meček kaj la kampadejo prezentas sufiĉe agrablan restadon per siaj parko, basenoj, klimato. Kompeneble la 10-taga IREN-programo en tiu ĉi bonega ripozejo estis trafa kombinaĵo.

Mi volas akcenti ke la programo estis vere abunda, interesa, varia kaj utila. La hungaraj dommastroj estis ĉiam afablaj, ĝentilaj kaj pretaj servi al ĉiuj partoprenantoj.



La du gajntoj de premia ferio en Abaliget, laŭ konkurso de E—G.

S-roj A. kaj T. Sekelĵ tre interese pliriĉigis la programon per siaj lumbildprelegoj pri Amazonio, Afriko, Azio kaj Jugoslavio. Pri Kanado prelegis s-ro Philip Alex.

La ekskursoj estis tre interesaj, precipe unu tuttaga, kiam la partoprenantoj vizitis la komunan tombejon de la bulgaraj soldatoj apud Harkány por meti florojn sur la tombon. Poste okazis vizito al Siklós. La folkloro vespero prezentita en la subĉiela teatro fare de la sindikato de HVDSZ el Pécs, malgraŭ la malvarma tago, ege varmigus la korojn de la partoprenintoj, tiel ke ekestis ĝenerala dancado apud la tendarfajro.

Mi dankas al la organizatoj kiuj donis al mi okazon prezenti ankaŭ miajn poemojn, dum la programo.

Fine mi dankas al la redakcio de E. G. de IOE pro la dektaga ĝuo, kiu havigis al mi 70 novajn geamikojn, kaj permesu al mi rekomendi al ĉiuj aboni la interesan EG.

Boris P. Kavalĝiev
Ruse, Bulgarujo



Naturamikoj ... amikas kun la naturo

Partoprenis 70 geesperantistoj el 12 landoj. Tiu relative malgranda nombro permesis al ni bone kaj rapide interamikigi kaj travivi 10 neforgeseblajn tagojn.

LA FELIĈO NE VENAS SOLA

Jam de antaŭ kelkaj jaroj mi lernas Esperanton, korespondas, ricevas revuojn — konatiĝas kun la mondo.

Miaj gekonatoj ofte demandis min: Pro kio vi elspezas vian monon por sendi bildkarton al Francujo, al Argentino?

Mi ne povis facile klarigi al ili miajn ideojn.

Nun la afero ŝanĝiĝis, ekde kiam mi gajnis vojaĝon eksterlanden en la Granda Konkurso de ESPERANTO-GAZETO. Dum la lastaj tri jaroj

mi ricevas EG-on, kaj la duan fojon partoprenas la Grandan Konkurson. Kaj la feliĉo venis. La abonkotizo estas malgranda, la solvo de la enigmoj iom pli granda, kaj la feliĉo plej granda.

Nur «Esperanto-Gazeto» de IOE donacas al siaj legantoj ses interesajn vojaĝojn eksterlanden, kaj ses aliajn malpli grandajn premiojn.

Post mia gajno neniu plu demandas min «kial vi elspezas vian monon por bildkartoj».

Al ĉiuj feliĉuloj mi deziras ĝojplenaĵojn vojaĝojn, kaj al ĉiuj legantoj de nia EG multajn ĝuoplenajn horojn dum la legado de la interesa kaj instruplena Esperanto-Gazeto!

D. Dimov
Ruse, Bulgarujo

D. Dimov, Bulgarujo



MI KONATIĜIS KUN HUNGARUJO

Kiam mi pasintjare decidis partopreni en la Granda Konkurso de Esperanto-Gazeto, mi ne kredis, ke mi ion gajnos. Mi intencis nur provi, ĉu mi povas ĝin solvi. Tamen mi gajnis la premion: 10-taga partopreno en Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj Naturamikoj en Abaliget, Hungarujo. Tio estis ĉio, kion mi sciis. Sed nun mi tute ne bedaŭras, ke mi gajnis ĝuste tiun premion.

Jam antaŭ la ekvojaĝo mi provis ekkoni almenaŭ iomete tiun ĉi regionon dank' al E-prospektoj, kiujn mi iam ricevis de Fremdultrafika Oficejo. Kaj la Renkontiĝo mem?

Ĝi estis vere internacia, ĉar venis homoj el 12 landoj kaj eĉ el Hungarujo ne estis la plimulto. Do vole nevole, ni ne troofte krokodilis.

La programo estis sufiĉe riĉa. Preskaŭ ĉiutage ekskursoj aŭ perpiedaj en pli proksima ĉirkaŭaĵo, aŭ per aŭtobusoj, kiam ni intencis viziti malpli proksimajn vidindaĵojn. Krom tio ĉiutage ni povis bani nin en apuda lago ĉar ankaŭ la vetero favoris nin.

En Hungarujo mi estis jam la duan fojon. Antaŭe mi partoprenis la UK en 1966 jaro. Sed tiam mi vidis nur Budapeŝton kaj Pécs kaj tio tute ne sufiĉas por havi la imagon pri la lando. La gajnita premio helpis al mi vidi parteton de simpla Hungarujo, kie ne venadas amase eksterlandaj turistoj. Kaj ĉar tiuj partetoj al mi tre plaĉis, mi decidis tuj poste viziti aliajn lokojn kaj urbetojn kaj nun, mia scio pri tiu ĉarma lando kaj ĝiaj tre simpatiaj loĝantoj tiel pligrandiĝis, ke mi ne pre denove devas reveni al ĝi.

Dum la III-a IREN okazis ne nur ekskursoj! Estis ankaŭ preskaŭ ĉiutagej ekzercoj en la prononcado. Tre utiliaj, ĉar ja ni estis el dek landoj, do ni tuj povis rimarki diferencon inter nia prononcado. Ankaŭ tre interesaj estis diversaj prelegoj kun lumbildoj pri malproksimaj landoj pri kiuj ni nur povas re- vi, kaj oficialaj kaj ne oficialaj diskutoj pri diversaj temoj.

Tiaj renkontiĝoj kiel IREN estas tre bonaj ne nur pro tio, ĉar ni povas ekzerci la lingvon en internacia societo kaj ripozi en pitoreska regiono, sed ankaŭ, ĉar ili montras al ni la landon kaj ĝian naturon, kaj estus ankoraŭ pli bone, se dum ili ni povus ricevi informojn ankaŭ pri aliaj tre vidindaj partoj de la lando.

Helena Bolanowska
Lodz, Pollando

En la internacia restoracio de Abaliget



ORA LISTO DE I. O. E.

Ekde la fondiĝo ĝis nun IOE ricevis multe da mondonacoj. Ili ĉiuj estis menciitaj en la aktuala n-ro de nia gazeto. Tamen, ĉar multaj donacas plurfoje malpli grandajn sumojn, oni ne vidas kiom da helpo ili efektive faris al ni. Pro tio ni decidis en ĉiu numero aperigi ORAN LISTON de 10 personoj kiuj ĝis tiu dato donacis la plej grandajn sumojn entute. Jen la unua listo:

1. S-ino Dorothy Henderson, Kanado	US \$ 1387,20
2. F-ino Betty Salt, Kanado	" " 962,40
3. Hans Werner Grossmann, Svisujo	" " 116,24
4. M., Italujo	" " 81,20
5—6. H. Scheffler kaj Felix Epstein F. R. Germanujo, po	" " 75,—
7. Arne Pedersen, Danujo	" " 70,70
8. Ernesto Sonnenfeld, Urugvajo	" " 60,—
9. A. Scheffer, F. R. Germanujo	" " 48,—

La 10-an lokon dividas Antonije kaj Tibor Sekelj Jugoslavio, po " " 41,70

Se eble iu dezirus eniri la liston, sufiĉas al la ĝisnunaj donacoj aldoni tiom, kiom estas necesa por superi kelkajn lastajn. Ĉi-foje — por iom helpi — ni donas ankaŭ la liston de la sekvantaj 10, kiuj havas plej grandan ŝancon eniri unu el la venontaj listoj: G. C. Fighiera (36,—), M. Kolinska (34,97), V. Kruusalu (34,08), H. Bakker filo (30,63), Ing. J. Dettwiller (25,12), K. Novak (16,70), Ark. J. Drifk (14,03), T. Lukoševičius (13,60), Z. Milosavljevič (12,80), A. Nothstein (12,41).

DONACOJ POR LA FONDUSO »OFICEJO«

Zaga Milosavljevič, Jugoslavio	\$ 1,—
Antaŭe kvitancita	\$ 891,21
Entute	\$ 892,21

DONACOJ AL LA GENERALA KASO

D. Dimov, Bulgariujo \$ 15.—

NOVAJ DIREKCIANOJ

BERNARD GOLDEN



Naskiĝis en Novjorizio (Usono) en 1925. Arkeologiajn studojn finis en Novjorko, en sia arkeologia profesio laboris en Usono, Meksiko, Britujo, Gvatemalo, Kenjo, kelkaj eŭropaj landoj kaj nuntempe en Ganao.

Lernis Esperanton en 1946, kvankam potenciala esperantisto denaska. Nome lia patrino iom lernis Esperanton en Bjalistoko, kie ŝi estis pacientino kaj konatino de d-ro Zamenhof.

Dum siaj vojaĝoj Bernard Golden konstante praktike uzas kaj propagandas la lingvon.

Mgr. TYBURCJUSZ TYBLEWSKI

Naskiĝis en 1933, en Sompolno, Polujo. Pedago, tradukisto, verkisto. Esperantistiĝis en 1951 en Vroclavo, kie li sekretariis. Gvidas filion de PEA en Jelenia Góra jam 10 jarojn. Organizinto de V. Internacia Geografia Semajno. Instruas E-on en lernejoj kaj kursoj. Publi-



LA DIREKCIO KONSTITUIĜIS

Post la Konferenco de la Direkcio en Ternitz kaj voĉdonado, la Direkcio de IOE konstituigis jene:

Direktoro: Tibor Sekelj, Pop Lukina 1, Beograd, Jugoslavio

Vicdirektoroj:

Gian Carlo Fighiera, 13 Rue de la Reinette, Bruxelles, Belgujo

Manfred Führer, Postfach 126, D 3340 Wolfenbüttel, F. R. Germanujo

Ernesto Sonnenfeld, Casilla de Correo 620, Montevideo, Urugvajo

Prof. Carl Støp-Bowitz, Camilla Collets vei 3, Oslo-2, Norvegujo

Generala sekretario: Antonije Sekelj, Kondina 24, Beograd, Jugoslavio

Financa konsilanto: Dipl. ing. Hermann Schalk, Löhrnerg. 4-1-2, A-1120 Wien, Aŭstrujo

Gvidantoj de sekcioj:

Science kaj tekniko: D-ro Wim de Smet, Wilgendreef 14, Heide, Kalmthout, Belgujo

Sociaj organizaĵoj: Manfred Führer (adreso supre)

Sporto: Maria Vitályos, C. Postala 14, Tirgu Secuiesc, Rumanujo

Komisiitoj por specialaj taskoj:

a) En kadro de turismo

»1000 lokoj«: Simone Humm, Chemin des 9 Peyres, 84 Avignon, Francujo

Danuba kampanjo: Antonije Sekelj (provizore; adreso supre)

»ESTO«: Tibor Sekelj (adreso supre)

Hoteloj kaj restoracioj: Josef V. Otta, Nerudova 32, Sumpark, Ĉeĥoslovakio

Muzeoj: Izolda Kaczmarczyk; ul Sniadeckich 26, Gdansk-6, Pollando

b) En kadro de kulturaj aktivadoj

Pupteatra Internacia Festivalo: Zlatko Tišljar, Stubička 75, Zagreb, Jugoslavio

Programcentro por pupteatroj: Roger Imbert, Jurjevka 49, Zagreb, Jugoslavio

c) En kadro de scienco kaj tekniko

Centro por medicina dokumentado: D-ro Lajos Molnár, Kelenhegyi u. 81, Budapeŝt XI, Hungarujo

ĉ) En kadro de diplomatio kaj itnerŝtataj rilatoj

Militista fakvortaro por internaciaj armeumuoj: majoro H. W. R. Petersen, 180 Onepu Road, Lyall Bay, Wellington 3, Novzelando

Revizia komitato:

Zagorka Maĝar, Cvijićevea 82, Beograd, Jugoslavio

Srg Arangelovič, 29 Novembra 37, Beograd, Jugoslavio.

NOVAJ MEMBROJ DE LA DIREKCIO

1) S-ro HANS BAKKER (filo), Kastelenstraat 231, AMSTERDAM 7,

2) S-ro BERNARD GOLDEN, P. O. Box 3, LEGON, Ganao

VIZITO AL INFANA KONTINENTO

Eta grupo iras al la insulo de infana feliĉo. Mi estas ekscitita kaj senpacienca. Mi deziras la unua ekvidi nian insulon pri kiu en Ŝibenik oni jam delonge rakontas. Mi vere ne scias ĉu tiu rakonto restos nur deziro aŭ realaĵo pri kiu konvinkigos la infanoj de la tuta mondo.

Kia granda ideo! Renkontigi sur malgranda insulo — kaj travivi la tutan mondon!

Mi estas senpacienca en atendado ke mi laŭeble plej baldaŭ donu la manon al amiko el malproksima lando; al nigra, al flava, al blanka. Mi vidas ilin en la vizio kiel senlime ili kuretas laŭ paŝvoĵeto, grimpas al marrokoj, ripozas en ombro de pinarboj, petolas en la malprofunda marakvo, konkuras en naĝado. Mi aŭdas iliajn laŭtajn voĉojn, kaj kvankam ili parolas diversajn lingvojn, mi divenas pri kio ili parolas. Ili interplektas la manojn en iu nova rondodanco, kantas komunan kanton kaj ridetas vaste, vaste...

Ni atingis la insulon. Jen ĝi antaŭ ni. Hodiaŭ senhoma, kaj morgaŭ eble troloĝata. Hodiaŭ sensignifa, morgaŭ la lulilo de ĉirkaŭprenoj, de plej sinceraj deziroj de pura infana koro, de ĝojkanto, rido sen larĉoj, la insulo de infana mondo.

Mi vagas tra la insulo vokante enpense niajn novajn amikojn. Mi estas nedireble feliĉa! Mi transdonas al mevoj kaj ondoj mian alvokon: »Venu amikoj laŭeble plej baldaŭ! Ni atendas vin. Ni ĝojas al la suno kaj la vivo. Ni montrus ke la distancoj, lingvoj, rasoj kaj haŭtkoloro ne dividas la homojn. Venu amikoj! Jugosiavio atendas vin.«

La vortoj flugis per mevoj alten, la ondoj forportas ilin...

La boato revenas, kaj post ni restas la SEPA KONTINENTO — la lando de infanoj. Ĝi iras for de nia rigardo, sed ne ankaŭ de la koro.

Kaj al vi, plenkreskuloj, senliman dankon pro tio, ĉar vi konstruos nian, infanan mondon kaj donos al ni eblecon renkontigi kaj amikiĝi.

Silvana Glinšek

Elementa lernejo »Simo Matavulj«, VII-a klaso
Ŝibenik (Esperantigis M. Ĝ.)



— La lastan fojon mi diras, mi definitive forlasas vin! Via misuzo de la akuzativo estas mizera... kaj la nekono de la pasivaj participoj kaj de -ig kaj -iĝ simple netolerebla!

PERANTOJ

Argentino: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, ROSARIO

Aŭstrujo: Aŭstria Esperanto Movado, Hofburg, Batthyanystrasse, A-1014 WIEN.

Aŭstralio: Kenneth G. Linton, 11 Poplar St., SOUTH CALFIELD, Vic. 3162. Abono: \$ 1.80.

Belgujo: „HEROLDO DE ESPERANTO“, 13 rue de la Reine, Bruselo 1., Abono 100 b. fr.

Brazilo: Alfredo Enio Duarte, Caixa Postal 18 (Esperanto) ZC-00, RIO DE JANEIRO, E.G.B., kaj BRAZILA ESPERANTO-LIGO, Praca de República 54, RIO DE JANEIRO.

Britujo: Brita Esperanto Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W 11.

Bulgarujo: Petr Ivanov Mutafčiev, ul. Persenk, bloko 20-A, SÓFIA-7, tel. 62 18 24; kaj Jordan D. Kalinov, Bul. „G. Dimitrov“, bl. „Debeljanov“ A-20, RUSE. — Tel. 25877. Abonprezo 5 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Jos V. Otta, Nerudova 32, ŠUMPERK. Jarabono 44 Kĉs. kaj DOVOZ TISKU, Praha 2 Vinohrady, Vinohradská 46.

Danujo: Ing. Uwe Lohse, str. Bakkesvinget 5, 3400. TULSTRUP/Hilrd. Poŝtĝirkonto 14 41 16. Abono DK 14.—

Finnujo: Joel Viikki, SOMERO-9.

Francujo: Germaine Kirtz, 5 bd des Alliés, F-68 MULHOUSE; Pĉk STRASBOURG No 993.48. — Abono: F 12,50.

Germana Feder. Resp.: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 WOLFENBÜTTEL; poŝtekkonto: Karlsruhe 1154 71.

Grekujo: Kimon G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos str. NOVA SMIRNA — ATHINAI. Tel. 931-214.

Hindujo: Hinda Instituto de Esperanto, P.B. 604, NEW DELHI-1.

Hispanujo: Juan-Luis Vallés, Apartado 7018, BARCELONA. Abono 140 pesetoj.

Hungarujo: Hungara Esperanto-Asocio, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII.

Israelo: Ben-Alder Jehiel, P.O.B. 379 PETAH TIKVA Ab. 6 liroj. Poŝtekk. Bank Hadoaz 445854-8.

Irlando: Pat O'Reilly, „Woodbine“, Bluebell, Dublin 12.

Italujo: Dott. Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gal-

leria Astra), 37100 VERONA. Abono 1.200 Liroj, poŝtĝirkonto n-ro 28/22942.

Japanujo: Internacia Fako, OOMOTO, Kameoka, Kio-to-hu

Jugoslavio: IOE, Lole Ribara 14, BEOGRAD, Ĉk 608-8-1353-10. Abono 15 N. D.

Kanado: W.D.B. Hackett 326 Soudan Ave, TORONTO 7. Ont.

Kubo: Raúl Juárez Sedeno, Apartado 570, CAMAGÜEY.

Madagaskaro: Eugène Ravéloson, Boite Postale 1678, TANANARIVO.

Meksiko: F-ino Margarita Nájera S., Lauro Aguirre 243-3, MEXICO 17 D.F.

Nederlando: Ing. D. Klage, Talingstr. 8., SCHOORL (NH). — Abono 7,50 hfl al Boerenleenbank Schoorl (NH), Kto 5082 R.

Norvegujo: Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S), Box 942, OSLO 1., Poŝtĝirkonto 100.31.

Pollando: S-ino Miloslawa Kolinska, Sopočka 2/2, SZCZECIN

Portugalujo: D-ro A. César Anjo, Av. 28 de mayo 12, VISEU.

Rumanujo: Prof. Szász Tibor, Str. Lenin 55, SF. GHEORGHE, Jud. Covasna.

Sovetio: Ivan Palkin, ul. Televidenija d. 7, kor. 3, kv. 44, MOSKVA M-449.

Valev Kruusalu, Pärja 42, TALLINN-9.

Romano Grinšpan, ul. Sajfulina 4, TASKENT 125, Uzbeka SSR.

Panas Vasilčenko, Poŝtkesto 375. KIEV 24. Abonprezo 4 rub.

Svedujo: Gerhard Nyqvist, Johan Skyttes väg. 5 JÖNKÖPING.

Svisujo: Manfred Führer, Postfach 162 D-3340 Wolfenbüttel, Germ. Feder. Resp. Pĉk. Zürich 80-67294.

kaj Claude Gacond, Miéville 133, CH-2314 LA SAGNE. Abono 9 Sv. Fr.

Usono: Conrad Fisher, R.F.D. No. 1., MEADVILLE, Pa. 16335.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Aptdo. 146, VALENCIA, Edo. Carabobo.

El ĉiuj aliaj landoj perantoj serĉataj. Perantoj ricevas 20%-an rabaton por kovri la kostojn.
ABONPREZO: 2 dolaroj aŭ egalvaloro